



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

aŭgusto (2) - '92

## Impresoj pri la UK...

Mi ne scias, kiel fartis la "ordinara" partoprenanto-esperantisto dum la viena UK, sed por movadaj aktivuloj, organizantoj ĝi estis brila okazo por persone renkonti la partnerojn, operative preparoli la estontajn komunajn agojn.

Okazis torento de dumkongresaj aranĝoj. (168 antaŭplanitaj + dekoj de surloke anonci-taj kunvenoj). Dum unuflanke ĝi estas pozitiva fenomeno ("ĉiu trovu programeron laŭ sia gusto") aliflanke la neevitebla samtempeco de pluraj aranĝoj ĝene malhelpis la laboron, ja multaj personoj estas interesitaj en pluraj fakoj... En iu tago ekzemple samtempe okazis la jarkunveno de fakaj asocioj ISAE (sciencistoj), ILEI (instruistoj), IEKA (aŭtomobilistoj), IKUE (katolikoj), UALE (artistoj), krome estis publika debato de landa agado de UEA, oni traktis la kongresan temon, ktp.

## La fakaj asocioj kaj la surpaperaj organizoj

Laŭtradicie preskaŭ ĉiu faka asocio aranĝas sian ĝeneralan membrokunvenon dum la UK-j. Estis kelkaj, kiuj post zorga preparo profitone eluzis tiun eblecon, kaj bone utiligis la okazon por komune preparoli la kurantajn aferojn. Ni menciuj TEJA (ĵurnalistoj), IKIEF (ekonomikistoj), ILERA (radioamatoroj), ILEI (instruistoj), ktp.

## Kial ni mensogu por ni mem?

Sed estis vere ŝoka kaj malentuziasmiga la t.n. jarkunveno de multaj tiel nomataj "fakaj asocioj". Krom esceptoj, estis okullfrapa ilia karaktero: malprofesia, surpapera organizaĵo. Kiel alinomi tiujn, eĉ famajn fakajn asociojn, kies ĝeneralajn kunvenojn partoprenas el la surpaperaj ekzistantaj plurecentoj nur 3-7 membroj, en pluraj kazoj eĉ nek unu estrarano...?

Okazis, ke la kunvenon partoprenis 39 homoj, kio ja montras ian interesiĝon al la agado de tiu asocio, - sed la nombro de membroj estis: 4! En alia t.n. "jarĉefkunveno" partoprenis 11 ĉeestantoj, sed krom la organizanto de la kunveno neniu havis antaŭe ian ajn rilaton al la koncerna "faka asocio". Ili tre bone babilis dum la kunveno, la sola problemo estis, ke ĉiu havis kaj alian profesion kaj alian interesiĝon...

## La komitato zorgis nur pri internaj aferoj...

Malgraŭ mia originala intenco (pro la tempo kongruo de diversaj kunvenoj) mi ne povis ĉeesti ĉiujn kunsidojn de la UEA-komitato.

daŭrigo sur la paĝo 5.

## Ne al glavo sangon soifanta...

# Esperantista solidareco

Kiam mi estis tute nova esperantisto, mi ensorbis la himnon, kantante ĝin dum tedaj inaŭguroj kaj rapidaj kongres-fermoj. Tiam mi estis tute ŝokita pro la malmoderneco de nia himno kaj pro patosaj versoj de ĝi; tiam mi pensis, ke eble necesas alpreni novan, pli modernan himnon; tiam mi ankaŭ pensis amason da aliaj mondsavaj pensoj.

Nun mi estas malpli certa. Mi ĉirkaŭrigardas kaj mi vidas ion, kion mi ne volas vidi. Mi,

kaj kun mi milionoj da aliaj homoj, vere preferus ke io tia estus nur invento de la amas-komunikiloj. Mi klopodas fermi miajn okulojn kaj orelojn, sed la informoj ĉiutage atakas min pli sovaĝe: jen oni masakris aŭtobuson da infanoj, por pruvi ke iksoj estas pli malbonaj ol ipsilonoj; jen oni mortigis tri flegistinojn, por pruvi ke kristan-islamaj paŝtunoj estas pli bonaj ol islam-kristanaj paŝtunoj; jen oni faligis daŭrigo sur la paĝo 6.

## Internacia Junulara Semajno, IJS-92

sukcese, bonetose pasis en Esztergom, Hungario, kun partopreno de ĉ. 120 gejunuloj el 19 landoj. Pro la ekster-Eŭropo de IJK, ĉijare IJS kaj MEJS estis la plej internaciaj junularaj someraj aranĝoj en Eŭropo.



Sur la bildo (antaŭe): Daniele Mistretta (I), Suzana Sz. Virág (H), Gabriela Tieghy (I).

## La eltiritaj citaĵoj

eble iel povos kontribui al la diskuto en EVENTOJ, diskuto vole-ne-vole resumanta ideojn, kiuj fortigas kaj mallfortigas sin reciproke tra jardekoj de nia esperantista ekzistado. Mi citos asertojn de diversaj statusoj, sen distingi, ĉu temas pri deklaro en grava dokumento, hipotezo en studo, aŭ frazo en respondo al intervjuanto.

1905. "La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa" ... "Esperantisto estas

nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li uzas ĝin".

El la Deklaracio de Bulonjo (teksto formulita surbaze de deklaracio de L.L. Zamenhof mem, la 7-an de aŭgusto 1905.)

1986. "Do, la kriterio de isteco estas ligita al la lingvo, dum la kriterio de ismeco estas ligita al minimuma komuna celo de movado.

Sándor Révész  
Sojle de la dua jarcento: historiaj rimarkoj.  
Literatura Foiro, n-ro 95.  
daŭrigo sur la paĝo 2.

## Teorio

1951. "La celo de la Esperanto-Movado estas plena apliko de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj..."

*El la Munkena Deklaracio*

1969. "Se oni aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al **malaprobo** de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo..."

*El la Deklaracio de IJK de TEJO en Tyresö, Svedio, la 3an-10an de aŭgusto 1969.*

1965. "Unue oni devas bone difini, kion oni nomas kulturo... Jam delonge oni metas diferencon inter la civilizo kaj kulturo: civilizo signifas plie la teknikon, kulturo plie spiritan progreson."

*K. Kalocsay*

*La hungara kultura revolucio.*

*Dek prelegoj (HEA, 1985), p. 95.*

1970. "Kulturi: 3..." Meti ion en favorajn kondiĉojn, por ke ĝi atingu plenan kreskon, multiĝon ktp: ... - historiojn en natura medio ... (analoge) ... ~i la Zamenhofan spiriton, 4 Perfektigi la spiritan evoluon de homo per racia edukado... ~o ... 5 Prizorgado kaj perfektigado de la spirita evoluo de homo..."

*Plena Ilustrita Vortaro, p. 594.*

*Ĉefredaktoro: Gaston Waringhien*

1968. "Kial la esperanto-movado bezonas altan kulturalan nivelon? Ĉar esperantismo, kiel lingvomovado, havas esence kulturalan karakteron. Altigante la kulturalan nivelon de la movado, ni kreas la kondiĉojn, en kiuj ni regajnas al niaj celoj la simpation de la intelektuaro. Sen ili esperanto ne havas esperon venki sian batalon..."

"Hodiaŭ oni ne plu diskutas pri la du famaj vojoj kiuj konduku esperanton al ĝenerala akcepto: nome pri la leĝfarado de **supre** - flanke de oficialaj instancoj - kaj pri la iompostioma ĝeneraligo de **malsupre**, flanke de la popolo. Ni superis tiun demandon ĉar ni laboras samtempe laŭ ambaŭ principoj. Hodiaŭ ni konscias, ke ambaŭ vojoj estas nedisigeblaj, ke agnosko **desupre** kuraĝigas plian disvastigon de la lingvo **malsupre**, kaj inverse, pli vasta aplikado **malsupre** trenas oficialajn rekonon **desupre**".

*Gian Carlo Fighiera.*

*En: Paŝoj al plena posedo, p. 96.*

1969. "La solvo de la lingvoproblemo per esperanto, kun ĉiuj pozitivaj kromefikoj, devas esti afero ne de espero aŭ de naiva fido, sed de firma konvinko bazita sur objektiva analizo de faktoj. Foresto de tia konvinko estas fonto de duboj kaj ne malofte eĉ de defetismo. ... **Defetismo ne estas allasebla** sur kiu ajn nivelo de batalanta movado..."

*Ivo Lapenna: Madridaj Tezoj.*

*En: Esperanto en Perspektivo,*

*p. 795. kun ekspliko sur la paĝoj 797-782.*

1980. "... la oficialigo de esperanto estas nek verŝajna, nek esenca dum la 80-aj jaroj... ni ĝuas kaj aplikas esperanton laŭ tio, kio ĝi efektive estas... ni celas diskonigi esperanton por pli kaj pli, iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn..."

*La Manifesto de Raŭmo laŭ Norvega Esperantisto 5/1991.*

1981. "Walter Zelazny: Ĉu ekzistas esperanta kulturo?"

*Kris Long:* Mi dubas. Antaŭ 2 jaroj mi vendis miajn eldonaĵojn al esperantistoj dum pola e-aranĝo OPERA kaj spertis, ke oni eĉ ne diferencigas unu libron de alia."

*Walter Zelazny:* Ĉu vi kredas la *finan venkon*?"

*Kris Long:* Ne! ... Ĉi-rilate mi ne estas kredanta homo. Por uzi esperanton mi ne bezonas ĉi tiun kredon.

*En Esperantujo ĉiu konas ĉiun, sed ili timas diri la veron pri aliaj... Kris Long respondas je demandoj de W. Zelazny.*

*Pola esperantisto, 1981/3-4, p. 14-19.*

1985. "... oni neniam difinis klare... la nocion de *praceloj*, ŝlosila vorto de raŭmismo... Kiel...? Mia hipotezo estas tio, ke (*La Manifesto*) parolas pri alternativaj celoj eksplike (!), sed implice ĝi parolas pri tio, ke la organiza principo de Esperantistoj ne estu celdirektita, sed libercela. Zelazny en 1979 parolas pri esperanto kiel *biologia konservanto* de la humanisma solvo de tutmondaj lingvaj bezonoj. ... Laŭ mia kompreno la pola branĉo (de raŭmismo) asertas jenon: Esperanto jes, povas esti efika alternativo al la ĝisnuna modelo de la internaciaj lingvaj rilatoj. La realigo estas ebla, kvankam tute ne certa. Laŭ Zelazny, la scienco tute ne kompetentas pri tio. La deklaro de PSEK (*Pola Studenta Esperanto-Komitato*) formulas tiel, ke la formale deklarataj celoj de la esperantismo estas eble atingebaj, sed en nekonata malproksima futuro..." "La adekvataj celoj ne estas nur *alternativaj* al la praaj, sed ankaŭ *survojaj* al ili. La celkonscia stabiligo de la esperanto-komunumo estas celo ne nur memvalora, sed ankaŭ la esperantismon biologie konservanta. La alternativaj celoj laŭ la manifesto estas kontraŭ-pracelaj, laŭ la eseo de Leyk: *al-praceloj*".

*Sándor Révész*

*Sojle, Manuskripto ĉe LF-Koop, p.18-19.*

1987. Mi diris, ke per ignoro stulte obstina

la registaro aŭskulti nin rifuzas?

Eĉ pli malbone — la registaro ĉina

por siaj propraj celoj la lingvon uzas!

*W. Auld: Bonan matenon, Majstro!*

*En barko senpilota.*

*Edistudio, Pizo, 1987, p. 451.*

1987. La membroj de la esperanta kultura komunumo elmigris al la insulo por formi, evoluigi kaj firmigi sian identecon inter ŝirmataj cirkonstancoj. La identeco ŝajne jam firmiĝis, kaj venis la tempo de la retrovo de kontaktoj kun la "kontinento".

*Vilmos Benczik,*

*Literatura Foiro, n-ro 100, p.9.*

1988. "Ni konscias, ke la tutmonda neesperantista kulturo dume superas la esperantan subkulturon... Ni strebas al kulturo kapabla detruji katenojn de homa spirita malliberejo... Ni surpaŝas la vojon al tia kulturo."

*Survoje. Numero 0,*

*La 31an de junio 1988.*

*Datirigo en la sekva numero.*

## Opinioj

### Piratoj en Esperantio

S-ro Golden tuŝis tre gravan problemon, ĉar "la piratado kaj nerespekto de aŭtoraj rajtoj" fariĝis bedaŭrinde **malbona kutimo** en la Movado.

Antaŭnelonge mi konstatis, ke la lernolibro de August Zweide (eld. 1979) sub titolo: "ESPERANTO laŭ patrina metodo" estas plagiato de Cseh-kurso kun nur aldona traduko nacilingven. La aŭtoro (ne plu vivanta) ne nur NE petis permeson de IEI, kiu posedas ĉiujn rajtojn rilate Cseh-tekstojn (kio troviĝas sur ĉiuj eldonaĵoj), sed eĉ ne mencias en tiu libro, ke li uzis la tekstojn de Andreo Cseh. Tio do estas ne nur malhonesteco, sed eĉ arroganteo. Mi bedaŭras, ke eĉ post la morto mi ne povas diri ion bonan pri li.

Tamen li ne estas escepto. Ekz. ĉinoj kaj kubanoj eldonis nian alian libron "KARLO" de E. Privat, kvankam en la libroj estas skribite "Ĉiuj rajtoj rezervitaj" - kaj la nomo de Internacia Esperanto-Instituto, IEI. Do la demando: *kiu devas gardi aŭtorajn rajtojn* restos senresponda, ĉar ankaŭ gvidantoj de EVA verŝajne estas nur amatoroj (bonvolemaj).

Nome de IEI:

*Mila v.d.Horst-Kolinska*

### Dek jarojn da malfruo

Estas strange, kiom da emocioj ankoraŭ hodiaŭ povas vekti la "*Manifesto de Raŭmo*". Dum pli ol jardeko oni en la movado - almenaŭ en la oficiala - prisilentis ĝin. Do la diskutantoj malfruas pli ol jardekon kaj prikritikas tekston, kiu jam delonge estas historia. La enhavo de tiu manifesto intertempe evoluis al la "*Deklaro de Segedo*". Tion oni devas pridiskuti kaj komenti. Aŭ ĉu ree oni volas malfrui jardekon?

*Herbert MAYER, Aŭstrio*

*Ĝuste la "oficiala prisilento" estas la kaŭzo de la nuna diskutado. Ja la respondo al la demando: "Kiuj ni estas esperantistoj" estas afero ne nur de kelkaj kleruloj, sed de ĉiu konscia esperantisto. Kaj trovi nian identecon estas ne simpla afero.*

*Cetere ni opinias, ke por trakti "Szeged"-on kaj "Voss"-on oni nepre devas digesti la antaŭajn konceptojn.*

*L.S.*



**LA DEKAMERONO**  
de Giovanni Boccaccio

## Esperanto aplikata

### Lernejaj ĝemeligoj

El la ĉefurbo Brazilio oni proponas ĝemeligon inter lernejoj, kie esperanto estas instruita. Ĝemeligo signifas la jenon: Esperanto-korespondado inter la gelernantoj de la lernejoj, interŝanĝo de informoj pri edukmetodoj, interŝanĝo de lernolibroj uzataj por instrui matematikon, geografion, biologion, historion ktp. interŝanĝon de fotoj, ktp. Interŝanĝantoj skribu al:

*E-Asocio de Brazilio,  
C.P. 11.1124, BR-70084 Brasilia DF.  
laŭ IPR 1/92.*

### Nova firmao "LERNADO"

Kelkajn jarojn en Peterburgo funkciis korespondanda kurso de e-to ĉe la kooperativo *Espero*. Nun la kurso apartiĝis de la kooperativo kaj registriĝis kiel memstara firmao *Lernado*. La firmao efektivas trigradan instruadon de e-to. Estas organizita korespondanda instruado ankaŭ de aliaj lingvoj. Funkcias korespondanda konsultejo pri psikologio, edukado, seksologio, juro.

*Lernado* povas akcepti ankaŭ turistajn grupojn. La statuto permesas ajnan komercan, produktan kaj peran agadon, kaj ni volonte traktos ĉiujn proponojn pri kunlaboro.

*RUS-197198 Sankt-Peterburg-198, p.k. 341.  
Rusio.  
laŭ Ruslanda Esperantisto 7/92.*

## Komerca aplikado

La Komerca Fakgrupo "La Rollagro" produktas kaj liveras diversajn radialajn rollagrojn kaj ties komponerojn.

*Komerca Fakgrupo La Rollagro,  
Platforma Industrială Scheia,  
R-5800 Suceava, Rumanio  
Telefaks: +40-987-25947*

\*\*\*

### Planata revuo: MERKATO

Silezia Esperanto-Asocio planas eldoni kvaronjaran revuon "Merkato", en kiu aperados reklamoj de malgrandaj firmaoj. Oni serĉas kunlaborantojn en diversaj landoj. La unua numero aperos aŭtune 1992. Skribu al la adreso:

*MERKATO,  
pk. 16, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wrocław 17,  
Polio.*

\*\*\*

"Kontakto" serĉas kontaktojn! La Ukraina Esperanto-Agentejo "Kontakto" serĉas samideanojn por turistaj aferaj kaj sciencaj kontaktoj laŭ la adreso:

*Tamara Popova prez.  
ul. Perekopskaja divizija 23, Odeseo  
UKR-270009 Ukrainio.  
Telefona: +7-044-630930.*

## Monda hejmo: ekologia centro

Ekologia Centro Internacia, kun esperanto kiel oficiala lingvo, aĉetis tri dometojn en ruina stato kaj apudan terenon en la preskaŭ forlasita vilaĝo Cauduro (40 km nord-okcidente de Beziers) kaj nun restaŭras la domojn. Ĝi serĉas membrojn kaj pruntintojn, kiuj poste ĝuos restadojn en vere ekologia loko, sen bruo kaj kun pura aero.

Informas la vicprezidanto:

*L. Ensuque,  
7 rue Gustave, F-34000 Montpellier, Francio.  
Franca Esperantisto, marto/92.*

## Esperanto en komerco


Kiu germana esperantisto kapablas kaj volas verki lernolibrojn kaj fakliteraturon por utiligo de esperanto en la komerco kaj ekonomio?

La subskribinto laboris en tiu kampo. Pro oldeco li serĉas posteulon, al kiu li povos transdoni materialon por tiu laboro. Esperantisto kun serioza laborintenco bonvolu kontakti s-ron

*Bruno Vogelmann-senior,  
Pistoriusstr. 52, DW-7180 Crailsheim,  
Germanio.  
laŭ Esperanto Aktuell 4/92.*

## KOMPUTILA RONDO

informilo 2/92 7a jaro



La bulteno *Komp-Ro* aperas 3-foje jare, formato A-5, 16 paĝoj. La informilo traktas praktikajn problemojn de komputil-uzado, kun aparta atento al la "esperantigo" de diversaj programoj. Abono estas nepre rekomendinda por ĉiuj komputil-uzantoj, inkluzive ĉiujn landajn asociojn kaj e-organizaĵojn!

Abonprezo: 9 DEM aŭ 6 respondkuponoj, por ne-transpagipovuloj: 5 DEM aŭ 3 respondkuponoj. (Eblas sendi ankaŭ ĉekojn, aŭ konverteblajn monbiletojn). Redakcia adreso:

*Komp-Ro, Jürgen Wulff, Bornkamp 12,  
DW-2000 Hamburg 70, Germanio.  
Telefona kaj fakso: +49-40-6560659.  
UEA-kodo: JWFF-M.*

## Skriba telefono

Mi lernas en la fako de komputiloj kaj antaŭ kelkaj semajnoj mi komencis labori per la grandaj komputiloj en "Majer"-konstruaĵo en Tenijon.

En tiuj komputiloj ni havas kelkajn interesajn aferojn, sed por mi la plej interesaj el ĉiuj estas la elektronika poŝto kaj komunikado per komputiloj. Per ĝi mi povas korespondi kun studentoj ĉirkaŭ la tuta mondo, sendi kaj ricevi leterojn trans la marego.

Antaŭ proksimume unu semajno unu el miaj amikoj rakontis al mi, ke estas ankaŭ io, kiu nomiĝas "IRC". Li diris al mi, ke uzi "IRC" estas simile al parolado per telefono. Mi decidis provi tiun "IRC" kaj mi provis ĝin.

Tiu "IRC" estas konstruita kiel telefono por kelkaj homoj, sed vi skribas anstataŭ paroli. Ĉiuj, kiuj uzas "IRC" havas specialajn nomojn, kiujn ili uzas dum la uzo de "IRC" (mi nomiĝas "Seleg").

"IRC" estas konstruita kun kelkaj temoj. Ĉiu, kiu uzas ĝin, povas paroli (angle) pri la temo, kiun li volas, aŭ krei novan temon.

Ĉiam, kiam mi diris al iu "esperanto", aŭ li ne scias, kio ĝi estas, aŭ li diris al mi, ke ĝi estas interesa, sed neniu parolas ĝin. Pro tio mi decidis krei novan temon - "Esperanto - lernantoj kaj instruistoj" - kaj vidi, ĉu iu venos paroli kun mi en esperanto.

Post kiam mi atendis malpli ol kvin minutojn, venis kvar studentoj al mia temo; unu ne scias, kio estas esperanto, unu parolis kiel mi, kaj du parolis tre bone. Tiam ni malpli parolis per esperanto ol pri esperanto, kaj mi lernis kelkajn novajn vortojn, kiel "krokodilo". Kiam ni devas skribi "ĉu", ni skribas aŭ "c^u" aŭ "cxu".

Tio estis tre interesa kaj mi decidis fari ĉi tion de tempo al tempo por praktiki mian esperanton.

*Ejal Peleg  
El Israela Esperantisto, junio/1991.*

"IRC" estas unu el la tipoj de "elektronika poŝto", kiu fakte estas iu reto de komputiloj. Pri la "elektronika poŝto" mem, kaj pri la uz-eblo legu la artikolojn en la revuo *Komp-Ro*. La Red.

## Karaj Legantoj,

la fakta aplikado de esperanto en la ĉiutaga vivo estas nia komuna intereso.

**Sendu ankaŭ Vi informojn al tiu ĉi rubriko!**


Helpu al tiuj, kiuj jam uzas la lingvon - sed la aliaj ne scias pri ili, kaj helpu al tiuj, kiuj nur volas uzi la lingvon!

## Aranĝoj

### BELaj Tagoj

11-15. novembro, Poprad, Slovakio

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) afable invitas Vin al BEL-aj tagoj. Temo de la seminario estas diversaj aspektoj de la Bahaa Religio kiujn ni traktos prelege, diskutronde, laborgrupo, ...



Ĝuste ĉi-jare la bahaaĵoj de la tuta mondo sole ne omaĝas la centjariĝon de la forpaso de Bahá'u'lláh. La personeco de Bahá'u'lláh postulas atenton ne nur de la bahaa-

noj, sed ankaŭ de esperantistoj, ĉar inter liaj profetaĵoj oni povas trovi ankaŭ jenan: "La tago alproksimiĝas, kiam ĉiuj popoloj de la mondo akceptos universalan lingvon kaj komunan skribon".

La kotizoj varias laŭ landoj 11-32 USD (por Orienta Eŭropo) kaj 105 USD por ceteraj landoj. Ĉiuj kotizoj estas pagendaj surloke.

Petu aliĝilon ĉe:

*Bahaa Esperanto-Ligo,  
Bernhard Westerhoff, Ulrich str. 20,  
DW-6000 Frankfurt 50, Germanio.*

### Vina Seminario!

01-04. oktobro, '92. Bzeneĉ, Ĉeĥoslovakio



- Preleĝoj pri la vinoproduktado kaj pri la ĝusta maniero de vingustumado (kun praktikaj ekzercoj...)

- Vizito de vinproduktejo kaj de ĝia kelo...

- Amuzvesperoj kun zimbazona muziko...

Kotizoj: 100 DEM, por orientanoj 1050 KCS, por hungaroj 3570 Ft (al LINGVO-Studio). Gejunuloj sub 30 jaraĝo havas ĉ. 10% rabaton. Pliaj informoj ĉe:

*ĈEJ, Jana Burianová, Pod nemoenici 35,  
CS-625)) Brno, Ĉeĥoslovakio.*

Somera E-Tendaro

### S.E.T.-93, Lančov!

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov okazigas en 1993. jam tradiciajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj denove en tri etapoj: A.: 4-16. de julio, B.: 17-31. de julio, C.: 01-14. de aŭgusto 1993.

Antaŭtagmeze instruado (40 instrueroj), posttagmeze banado kaj boatado en lago, ekskursoj (ankaŭ al Vieno), bivakfajroj, karnevaloj. Loĝado en kabanoj meze de la naturo.

Kosto: 210 DEM, por eksoc.landoj: 130 DEM, por ĉeĥoj kaj slovakoj: 1600 KCS. Pliaj informoj petu ĉe la adreso:

*Esperanto, CS-674 01 Trebič, Ĉeĥio-Slovakio.*

Kastelspiritoj - Brrr...

### Renkontiĝo en monto-kastelo

8-11.10.1992, Aŭstrio.

Ĉi-jare MKR signifas "Montkastela Renkontiĝo". Ĝi okazos en la Kastelo Stibichhofen, Rebenburggasse 2, A-8793 Trofaiach, tel. +43/3847/2260.

**Programo:** tuttaga surmonta migrado por sportuloj; laŭ via propra plaĉo pli mallongaj migradoj; ekskurso; vesperoj...


Vi bezonos: mont-taŭgajn ŝuojn, dorsosakon kaj trinkujojn por la ekskursoj, varmajn kaj pluv-protektajn vestaĵojn.

**La kotizo:** 670 (surloke . 770) ŝilingoj; por ne-transpagipovuloj rabato de 200 ŝilingoj. Pli ol 30-jaruloj krompagas 200 resp. 100 ATS.

En la olda kastelo onidire

"vivas" pluraj kastel-spiritoj. Eble surloke oni povas krompagi por ne-renkonti ilin...

*Aŭstria Esperanto-Junularo,  
Pf.804, A-8011 Graz, Aŭstrio.*



**Ĉu vi jam havas,  
kaj uzas ĝin?**

### Kurso por e-instruistoj

### Instrui komunike

Laŭ tiu titolo okazos intensa tri-taga kurso por instruistoj kaj -antoj en la Esperanto-Centro Poprad de la 6a ĝis la 9a de novembro '92. (de vendredo posttagmeze ĝis lunde posttagmeze).

Organizita de ILEI, la kurso demonstras kaj praktikigos la situaci-komunan manieron instrui lingvojn, specife laŭ la lernolibro "Tendaraj Tagoj" kies dua kajero ĵus aperis. La kurso gvidos la aŭtoro de la lernolibro, Stefan MacGill. Kursanoj ne nur ekscios pri la principoj kaj teknikoj de komunika instruado, sed aktive ekzercos ilin en etaj grupoj. Instruistoj el diversaj landoj bonvenas, ili havos okazon rakonti pri siaj spertoj kaj problemoj en la instruado kaj diskutigi ilin komune.



La partoprenkotizo estas intense tre modesta, kaj inkluzivas tri manĝojn tage. Por dormantoj en la Centro mem la tuta kotizo estas nur 48 NLG aŭ 144 SEK (1400 Ft. por eksoc.landanoj). Por dormantoj en pli luksaj apartamentoj en promendistanco de la Centro: 60 NLG aŭ 180 SEK (resp. 1900 Ft). Nemembroj de ILEI pagos 10% pli.

Poprad ofertas agrablan kompanion, bonan etoson, freŝan aeron, belan naturon kaj modernajn prezojn. Kaptu la okazon konatiĝi kun ĝi!

ILEI starigis al si la devon oferti kvindek lokojn en instruistaj kursoj en 1993, jen la unua paŝo al tiu celo. Interesatoj petu aliĝilon de ILEI:

*Esó u. 7, H-1034 Budapest, Hungario.*



3-a staĝo por

### Korusa Kantado

Inter 21-27. septembro, La Freychede, Montferrier, Suda Francio.

Lokaj e-grupoj de Pireneo invitas Vin al komuna korusa kantado sub gvidado de Petro De Smet (Belgio).

Tage korusa kantado, posttagmeze ekskursoj. Aliĝkotizo inter 200 kaj 350 FRF, restadkosto minimume 500 FRF.

Pliaj informoj:

*"Jorgos", F-09129 St. Felix Rt, Francio.*

*Tel: +33-61-608683*

## Impresoj pri la UK...


daŭrigo desur la p. 1

Sed tiuj 4-5 fojoj, kiam mi ĉeestis, estis por mi malallogaj. Mi decidis ĉesi tiujn vizitojn, kiam oni foruzis plenan posttagmezon (ĉ. 20 % de la tuta kunsid-tempo!!) nur al unu demando: "Membro-organizoj el la eksa Jugoslavio", kaj en la fino de la longa diskuto estis akceptita rezolucio, kiun duono de komitatanoj komprenis tiel, la alia duono aliel... Por la movada analizo, por komunaj kampanjoj, por strategiaj demandoj jam ne restis tempo.

Daŭre mi havas la dubon, ke la ĝisnuna maniero estas la plej bona solvo al nia movado. Dum la tuta semajno la komitato, - la plej supera instanco (!) de UEA, kunsidis entute nur ĉ. 15 horojn. Ĉu tiuj 15 horoj estis "La kongreso"? Ĉu dum tiuj horoj oni traktis kaj solvis la plej gravajn movadajn problemojn? Aŭ ĉu ĝi ne estas celo?

## Ŝokiĝas la oficistoj

La kongresejo *Austria Centro Vieno* estas eleganta, bone ekipita vera kongresa centro, kiu donas hejmon unu post la alia al konferencoj, kongresoj de diversaj sociaj organizoj. Ni faris vere profundajn impresojn al ili, ja post la dua-tria tago ili estis perfekte ŝokitaj... La ekstera aspekto de esperantistaj kongresanoj estis la unua impresio (anstataŭ la kutima, eleganta, kravatula intelektularo aperis io alia, ni diru: "senzorge leĝere vestita amaso de alia socia tavolo"). Pliiĝis la efikon kelkaj "memzorgantoj", kiuj kaŝis sin por punkto en la kongresejo, aliaj trovis tranoktejon en la aŭto-parkejo, kelkaj eĉ simple sur la herbo ĉirkaŭ la kongresejo... La fina bildo ĉe ili elformiĝis en frumatenoj, kiam la purigistoj trovis homojn "spruce-duŝi" kaj matenmanĝi en la necesejoj... (komprenu bone: temis ne nur pri orient-eŭropanoj...) Unu el la lokaj oficistoj iom amare komentis la impresojn: "...la mondkongreson de esperanto ni imagis iom alia..."



Ni nepre bezonas ian amasan, internacian kunvenon de esperantistaro, ja ĝi estas fakta bezono, kaj ankaŭ movada intereso. Sed ĉu ne estus pli oportune nomi ĝin alivorte, aranĝi ĝin en pli simpla, malpli reprezenteca loko? La mondo neniel volas akcepti nian ĝisnunan difinon de "kongreso" (kaj formas ian bildon pri ni). Samtempe ĉu ni ne devus reprimensi la neceson aranĝi almenaŭ de tempo al tempo ankaŭ **laboran kongreson?**

László Szilvási, Hungario

## Movado

### Prelegvojaĝo

S-ro d-ro Erich-Dieter Krause el Leipzig, intencas fari prelegvojaĝon tra Belgio.

S-ro Krause prelegis naci- kaj internaciskale, i.a. en la UK-oj/Kongresaj Universitatoj en Varsovio kaj Brajtono. Li estas membro de Akademio de Esperanto, prezidanto de Saksa Esperanto-Asocio. Li intencas fari prelegvojaĝon fine de septembro ĝis la 11-a de oktobro. La temoj estas pri esperanto, pri la influo de naciaj lingvoj al esperanto kaj pri Leipzig.

Bv. kontakti lin:

Semmelweis str. 7,  
DO-7010 Leipzig, Germanio.  
el Fenomeno, 4/92.



### Esperanto Aktuell

La revuo *Esperanto Aktuell*, organo de Germana Esperanto-Asocio, ekde 1992. aparas laŭ nova ritmo: okfoje jare kaj alterne german-kaj esperantlingve. Eksterlandaj abonantoj ricevas nur la esperantlingvajn eldonojn (20 DEM), se ili ne aparte mendis ankaŭ la aliajn (entute 30 DEM).

Redaktoro de la esperantlingvaj numeroj:  
Ulrich Becker, Küsstriner str. 3, DO-1092 Berlin.

Redaktoro de la germanlingvaj numeroj:  
Frank Stocker, Alban-Stolz str. 20,  
DW-7800 Freiburg.  
laŭ *Esperanto Aktuell*, 4/92.



### Lerneja statistiko...

La numero 1/92 de la revuo *Internacia Pedagogia Revuo*, IPR, organo de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) prezentas la statistikon pri instruado de esperanto en la elementaj kaj mezaj lernejoj en 1991/92. La listo enhavas datumojn de 19 landoj. Laŭ ĝi en bazaj kaj mezlernejoj esperanton lernas sume (!) 2455 lernantoj, sed inter ili estas 1688 hungaroj...

Laŭ IPR 1/92.

Laŭ tiuj datumoj ni havas du pensojn:  
2455 entute - 1688 hungaraj = 767 ceteraj... Ĉu certe la ciferoj estas precizaj?

Ĉe aliaj fremdlingvoj: germana, rusa aŭ la angla, plejofte mem la instru-materialo edukas al la germana, rusa, brita aŭ usona kulturo. Ĉu en la lernejoj oni studas nur la lingvon esperanto aŭ la lernantoj estas ligitaj ankaŭ al la movado?

Kvankam ĝis tiu ĉi jaro mi aktivis ĉefe en la junulara movado, bedaŭrinde mi konas ege ne multajn esperantistojn, kiuj lernis la lingvon en la baza lernejo. Mi timas fari konkludon...

Suzana Sz. Vörög, Hungario.

## Infandesegnaĵoj

Okaze de la *Internacia Infansemajno*, komence de oktobro Kroata Esperantista Unuiĝo organizas internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj - diverstemaj. Bonvolu sendi kontribuojn grupu ĝis la 15-a de septembro. Estas bonvenaj ĉiuj desegnoteknikoj, uzenda formato: A4.



Ĉiu E-grupo (lernantoj ĝis 15 jaraĝaj), kiu partoprenos la ekspozicion, ricevos donacon de la organizantoj.

Bonvolu al ĉiu desegnaĵo aldoni nomon kaj aĝon de la infano, kaj al la kolektaĵo informon pri la E-grupo, pluse adreson. Ni preparos koncizan katalogon kun tiuj datenoj.

La desegnaĵojn la organizantoj ne redonos, ĉar ili planas organizi pliajn ekspoziciojn en Kroatio (kun informoj al la partoprenantoj).

Adreso de la organizantoj:

Kroata Esperantista Unuiĝo,  
Trg burze 2., 41000 Zagreb, Kroatio

## Alvoko!

### Alvoko al redakcioj de E-revuoj!

Ĉu vi permesas, ke mi proponu etajn plibonigojn por via revuo?

Jen ili:

- » a) aperigu la informon ekz. "revuo fondita en la jaro ... aŭ aperas ekde ... ĉiumonate aŭ ... (aldonu la ritmon de aperado).
- » b) numerigante la paĝojn aldonu: nomon de la revuo (gazeto), numeron kaj monaton, simile kiel faras la revuo *Esperanto* aŭ *Heroldo*.

Tio necesas kiel informo, se oni fotokopias iun el la artikoloj. Multfoje aperas fotokopioj SEN tiu informo, kiun oni forgesas aldoni manskribe. Al fotokopiado de artikoloj mi instigas e-instruistojn por progresigaj kursoj, kiel la plej aktualan kaj interesan instru-materialon.

La supraj proponoj estas en la intereso ankaŭ de la redakcioj.

Mila v.d. Horst-Koliska, Nederlando

## Esperantista solidareco

daŭrigo desur la paĝo 1. bombojn sur mezepokajn palacojn por iom timigi la loĝantaron; jen oni deklaris ke ĉiuj, kiuj ne estas kiel ni, estos subpremataj, kaj tiel plu, senpaŭze.



Kiel en horror-filmo (cetere se vi estas juna, moderna kaj usoneca vi ja ŝatas horror-filmojn, ĉu ne?) mi vidas la mezepokon reaperi el la fundo de la historia pasinteco kaj rekapti la homojn, kiuj vane pensis ke ili alvenis al la epoko de racio, aŭ eble eĉ al la histori-fino.

Tiu nuntempa mezepoko alprenas malsamajn vestojn en malsamaj lokoj. Ĝenerale ĝi prezentigas kiel reviviĝo de religia fundamentismo (islamanoj, judoj kaj kristanoj kune spertas la saman fenomenon) kaj de egoismoj ĉiuspecaj kaj ĉiunivelaj (landaj, naciaj, lokaj), kiuj estas nun asertataj per mortigado pere de la plej rafinitaj modernaj armiloj.

Antaŭ multaj jardekoj, kiam mi mem kaj preskaŭ ĉiuj el la nunaj gvidantoj de la Esperanto-movado ankoraŭ ne estis naskiĝintaj, simila mezepoke malluma nubo estis invadanta la mondon. Temis tiam pri naziismo kaj faŝismo (kaj stalinismo). La tiama movado ne

komprenis la danĝeron de la situacio kaj simple elportis la sekvojn de la barbareco. Tio, kio frapas nun, jardekojn kaj masakrojn poste, estas la naiveco de kelkaj sinceranimaj tiamaj klopodoj de la esperanto-movado trovi kunviv-eblecon, kompromisi.

Mi esperas ke ĉi-foje ni ne estos same naivaj, interalie ĉar la perfortistoj klare deklaras siajn grandpotencajn strebojn. Ne estas spaco por esperanto, por nia interna ideo kaj niaj idealoj, por interhoma frateco en la menso de tiuj, kiuj pensas ke la iksoj estas la plej gravaj en la mondo.

### Tiacele mi pensas ke ni devus:

- » Tuj eklanĉi fondaĵon por helpi la esperantistojn, kiuj estas viktimoj de la militoj nun okazantaj ie ajn en la mondo. Nia unua tuja devo, ŝajnas al mi esti la helpo al niaj samideanoj, kiuj estas rekte trafataj de la militaj katastrofoj, devas forlasi siajn hejmojn, estas senhelpaj, senmonaj, izolitaj, suferas vundojn aŭ funebrojn pro mortigitaj parencoj. Mi kredas ke UEA devus iom pli alten, ol ĝi faris ĝis nun, levi la flagon de la interesperantista solidareco, kaj fari sian eblon por helpi, ĉie kie tio estas bezonata sen distingo pri nacieco, raso, religio.
- » Ni devas teorie pli bone kompreni tion, pro estas okazanta, debati pri ĝi, kleriĝi pri ĝi. Mi kredas ke tiurilate niaj lingvistoj, etnistoj kaj antropologoj estos kiel kutime je dispono por klarigi la distingon kaj la tre profundan historian malamikecon inter sud-osetoj kaj nord-osetoj. Sed iu, alivorte ni, la kutimaj esperantistoj, devas organizi ĉi tiujn seminariojn, prelegojn, debatojn, laborojn de la afero.

Ĉi-rilate, interparolinte kun kelkaj respondeculoj de UEA, kaj unue kun ĝia prezidanto,

J. Wells, mi trovis ke ili estas tre malfermitaj je ĉi tiu problemoj kaj pro la urĝo (ne povante atendi ĝis la Universala Kongreso pro la rapida sinsekvo de militaj katastrofoj), ni pensis malfermi konton ĉe UEA al kiu ĉiuj esperantistoj dezirantaj helpi aliajn milit-viktimojn esperantistojn povas sendi monan kontribuon. La mono estos uzata nur por helpi esperantistojn trafatajn de militaj eventoj. Dum la Universala Kongreso en Vieno oni povos decidi pri kelkaj praktikaj demandoj kunligitaj kun ĉi tiu agado kaj ankoraŭ ne solvitaj.

La konto, jam malfermita, havas la kodon "glav-", kaj la tuta agado provizore nomiĝas "Ne al glavo...".



Mi certas, ke esperantistoj respondos per sia kutima malavareco. Ĉiu, kiu havis amikon aŭ korespondanton ekzemple en Sarajevo, certe komprenas miajn sentojn.

Kontraŭ la dividiteco de la homaro en reciproke malamikaj gentoj la Esperanto-movado daŭre agis. Mi pensas ke ni devas pretegi nin por daŭrigi tiun agadon kaj ke por la momento ni materie helpu la anojn de nia komunumo, kiuj bezonas nian helpon.

Viajn kontribuojn sendu al UEA, kodo: "GLAV", Nieuwe Binnenweg, 176, NL-3015 BJ Rotterdamo, Nederlando laŭ via kutima maniero, ankaŭ pere de viaj landaj perantoj, menciante la konton "glav" aŭ la agadon: "Ne al glavo...".

Renato Corsetti, Italio

Rim: Ankaŭ malgrandaj helpo-sumaj bonvenas, ja centoj de ili jam faras konsiderindan sumon.



## La diktatoro

filmo de Charlie Chaplin

La temo de la pasintjara filmofestivalo en Perpignan, *Confrontation XXVII* estis "Eŭropo 39-45". La unua prezentita kaj pridiskutita filmo estis "La Diktatoro" de Charlie Chaplin.

Jam de jaroj mi aŭdis flustre, ke Chaplin iel simpatiis al esperanto kaj eĉ uzis ĝin por filmo. Mi foliumis la postmilitajn jarkolektojn de nia gazetararo en mia posedo, sed mi ne trovis multon pri la temo. Ĉu nia kolektiva lingva purismo kaj ŝovinismo cenzuris la ne-laŭfundamente skribitan esperanton? Ja en la koncerna filmo troviĝas ne akademie skribitaj vortoj...

Chaplin frue perceptis la danĝeron de hitlerismo pri kiu li volis atentigi la mondon. Sian genian talenton kaj sian fizikan similecon al la nazia diktatoro li lerte uzis por filmo, kiun li mem produktis en Usono.

Unu semajnon antaŭ la komenco de la dua mondmilito startis la filmado, kaj daŭris ĝis la mezo de la sekva jaro.

En la filmo sur la muroj kaj butikoj de la juda geto estas pluraj surskriboj prenitaj el es-

peranto, kiel "lipharoj, kafejo, vestaĵoj malnovaj, cigaroj, cambroj, terpumoj" k.a.



"Fuŝaĵo!" - mi aŭdis de lingvopuristoj! En la vortoj "tabakbutiky" aŭ "restoraciz" ili eĉ vidis nenion komunan al nia lingvo!

Tamen, tamen!

Sen paroli pri la supersignoj, la alprenode okulfrapaj finaĵoj plej verŝajne donis al Chaplin impreson pri ankoraŭ pli da fikcio.

Mi konsultis sufiĉe multe da libroj kaj artikoloj pri Charlie Chaplin kaj lia filmo "La Diktatoro". Mi nenie trovis aludon pri esperanto...

Kiam mi havis la okazon paroli kun esperantistoj pri la skriba uzo de esperanto en "La Diktatoro", mi neniam renkontis entuziasmon, tute male, kvazaŭ se temus pri sakrilegio...

Fikcio estas la formo, kiun Chaplin elektis por liveri sian alarm-krion pri kaj dum danĝera epoko de la monda historio.

La filmon oni nepre devas spekti ankaŭ interlinie. Tion farante la esperantistoj certe konvinkiĝos, ke en tia kunteksto, Chaplin ne aĉe, sed altpense utiligis esperanton.

Pasintjare *Literatura Foiro* eldonis videokasedon pri esperantaj filmoj, i.a. "La Diktatoro" eltiraje.

Jean Amoureux  
laŭ Franca Esperantisto 2/1992.

## Esperantistoj: ĉu margenuloj de la socio?

En brilpromesaj tempoj de Zamenhof homoj emis kredi, ke ĉio, kio utilas, pli-malpli frue ankaŭ efektiviĝas. Necesas nur montri la utilon, klarigi kaj konvinki. La homa scio senĉese multiĝas kaj plibonigas la socion. Tio validas ankaŭ pri esperanto, kiun ĉiuj homoj facile lernas kaj per kiu ili interkompreniĝos, lingve kaj sente. Dank' al la kreskanta sciaro, ankaŭ sociaj diferencoj malaperos aŭ, almenaŭ, onia socia loko dependos nur de la lernitaj scioj kaj labora klopodemo. Mi certe troigas pri tiu priskribo, sed mi kredas, ke mi kaptis ne tute malĝuste la spiriton de tiuj tempoj.

Ni scias, ke la dudeka jarcento ne plenumis tiujn esperojn. Pri pli ol socia egaleco ni plu esperas (nesciante, kio rezultigos ĝin: *popopola* kapitalismo, novspeca socialismo aŭ io alia), sed post Hiroŝimo ni certas: pli da scio ne nepre estas pli da bono. Kaj esperanton, kvankam ĝi estas kompare bona solvo de la lingva problemoj, lernis nur sensignifa parteto de la homaro.

Kiuj estas tiuj malmultaj homoj? Ĉu iuspecaj homoj pli emas esperantistiĝi ol aliaj? Ĉu eble nur nekutimuloj faras tion, kaj esti esperant-lingvano ne apartenas al la ideo pri socia normaleco? Ĝis nun mankas vera soci-sciencia priskribo pri la tuto de nia maldensa, sed tutmonda verda socio (legantoj de la angla povas trovi pri la temo *The Esperanto Movement* de Forster aŭ studon fare de Claude Piron en *Interlinguistics* de K. Schubert).

La granda ĉirkaŭa socio ofte traktas nin iel margenule: la uloj, al kiu ĉiam venas fremduloj; la maljunulo kun verda insigno, kaj ĉiam parolas pri la sama temo; la instruisto, kiu partoprenigas miajn infanojn en senutila kurso. Same kiel antaŭjuĝo signifas nur: prijugo farita antaŭ vera ekkono, kiu povas montriĝi poste ĝusta aŭ malĝusta, margenulo ankaŭ estas nek pozitiva, nek negativa esprimo.

Margenulo troviĝas margene, rande, malcentre de la socio, ĉar li/ŝi vivas mallaŭ kelkaj aŭ ĉiuj ĝiaj reguloj. La sociaj reguloj estas malperfektaj. Okazas, do, ke margenuloj vivas laŭ pli perfektaj kutimoj kaj manieroj, kiujn la granda socio nur pli malfare (se entute) akceptos por si. Tio nomiĝas ofte alternativa, kaj tiusence ankaŭ la alternativaj verduloj, naturistoj, viand-nemanĝantoj, kontraŭ-alkoholistoj ktp. estas margenuloj.

Jen do ni aperas kiel pozitivaj margenuloj. Ne gravas, se ni malmultas kaj plejparte ŝajnas malsukcesi: ĉiu granda movado necese komenciĝis tiel. Fidel Castro, kies aperon en la 1990-jara Universala Kongreso kaj senkondiĉan jeson al esperanto oni ankoraŭ multmaniere

priopinios, komparis nian movadon eĉ kun la frua kristanismo...

Socia margeneco kiel malriĉegeco, krimemo, drogemo, ktp. ne oftas inter esperantistoj. Sed multas stranguloj kaj problemuloj. Ofte problemuloj fariĝas stranguloj: ili venas al esperanto, ĉar ili malfacile kontaktas siajn kunhomojn. La trankvila, komprenema medio de esperantistoj en multaj kazoj forigas tiujn zorgojn kaj plifeliĝigas tiujn homojn. Tamen, aliaj trovas, ke iliaj esperoj pri esperanto estis troaj: ili forlasas esperanton, aŭ, tute male, faras el ĝi sian ĉefan okupon. Ili ne ĉesas rekomendi kaj reklami la lingvon, surmetante ŝtrumpetojn kun verda stelo kaj metante etan Zamenhofon sur sian tablon. Pro ili la ĉirkaŭ-socio rigardas nin kiel strangulojn feliĉe, ilia nombro nuntempe eble malkreskas.

Tamen, la plej grava kialo veni al esperanto estas la deziro ekkoni aliajn homojn kaj kutimojn. Eblas diri: Sed tiu esperantisto eĉ ne konas sian apudulon en la domo, kial li do korespondas kun Ĉinio? Unue, ĉar intersiĝemuloj ŝatas intersiĝemulojn, kaj krome, siajn kunvivantojn oni ne elektas, sed siajn korespondantojn jes... Amikoj kaj geamantoj ofte pensas: Sen esperanto ni neniam estus trovintaj nin!

Kaj mi timas, ke ĝuste tiu deziro koni fremdulojn restas margena afero en plej multaj landoj. En la tiel nomata Tria Mondo, kie ofte trovi sufiĉan manĝaĵojn estas ĉefproblemo, ne restas intereso por foraj fremduloj. En la cetero de la mondo, vojaĝi signifas por la meza homoturismi. Turismo estas speco de industrio, kaj pli rektaj kontaktoj kun alilandanoj, sen la neceso de pagataj perantoj, metus finon al tiu enspeziga agado. Krome, grandaj kulturoj preferas okupiĝi pri si mem: tiujn ĉi liniojn mi skribas en Usono, kie la plejparto de la loĝantoj kutime ne scias, kie troviĝas mia lando. (Nu, mi konfesu, ke ankaŭ hungaroj kutime ne scias, kie troviĝas la ŝtato Michigan.)

Kaj tio estas la ĉefa kaŭzo de nia margeneco (ĉu mi diru supereco?): en la mondo, la meza sociano ne bezonas aŭ ne sentas la bezonon de interkulturaj kontaktoj, dum por ni ili konsistigas (en ideala kazo) nian vivmanieron. Eble tio komencos ŝanĝiĝi en Eŭropo, kiu faras la unuajn timajn paŝojn al vera unuigo... En unueca monda kulturo, kie tamen ne malaperos la naciaj malsamecoj, ni ne estu plu margenuloj. Kaj ĝis tiam ni diru: ni staras sur la margeno, sed **nia** margeno estas antaŭ la centro!

István ERTL  
Kontakto/91.

## Esperanto en radio

### Ekmutis la Esperanto Fakoj de Radio Zagreb

La esperanto-elsendoj de Radio Zagreb komenciĝis en aprilo 1953. En julio de la sama jaro okazis en Zagreb la UK, la unua en la Balkano.

Tiam, en 1953, neniu povis imagi, ke 39-jarojn poste la stacion oni nomas ne *Radio Zagreb*, sed "*Kroata Radio, studio Zagreb*". Nek tiam, nek poste iu ajn supozis, ke la esperantaj elsendoj post 39-jara seninterrompa daŭro estos nuligitaj sen eĉ unuvorta skriba deklaro. Sen argumento, sen ia sciigo al la kolektivo, kiu preparadis ilin. Preskaŭ 4-jardeka daŭro okazis sen malfruoj, konstante ĝustatempa eĉ dum la bombardado de Zagreb.

La lasta elsendo estis la 28-an de junio. Post tio, la esperantaj vortoj en la ondolongoj de Kroata Radio ekmutis. (*Laŭ zagrebaj onidiroj unu el la novaj ĉefoj de la Radio aprezis esperanton kiel "komunista postrestaĵo", kaj donis perbuŝan komandon por tuje nuligi la elsendojn. La red.*)

Nun, kiam niaj aŭskultantoj ne plu povas aŭskulti nian programon, dankon al ĉiuj, kiuj subtenis per kuraĝigaj vortoj la esperantajn elsendojn.



En la adiaŭa artikolo iom amara penso trudas rimarkon: La radio-direktoj ne povus tiel senargumente kaj subite nuligi esperantan programon, se esperantistoj estus montrintaj pli grandan intereson por tiu aktivado. Tio mankas. Nur deko da stacioj elsendantaj esperante, vere ne povas imponi. Kaj nenia kampanjo iam ajn okazis por plibonigi tion.

Multaj esperantistoj simple ne komprenas la gravecon de tiu aktivado... La sekvo de tio estas la nuligo de esperantaj elsendoj ankaŭ de Kroata Radio.

Emilija Lapenna.  
ligita al e-elsendoj de 1953 ĝis 1992.  
laŭ Kroata Esperantisto, 1/92.

#### ESPERANTOJ

- Ŝajnas, ke mi povos partopreni nur la UK-en en la jaro 1993!
- Mi ŝatus aboni nur la Eventoj-n !!!



## Anoncetoj

Mi serĉas membrojn por fondi esperantist-  
tan nifologian asocion. Bv. aldoni IRK aŭ el  
Hungario respondkoverton.

*Dénes Pártay, Damjanich u. 1/I, 3/2.,  
H-7400 Kaposvár, Hungario.*

\*\*\*

Esperanto Klubo en Kalisz (centro de Po-  
lio, ĉ. 100 mil loĝantoj) serĉas kontaktojn kun  
similaj kluboj el la tuta mondo. Ni volus kun-  
labori pri interŝanĝo de kulturajoj, turismo  
kaj reciprokaj vizitoj. Nia adreso:

*PL-62-800 Kalisz, str. Serbinowska 25, Polio.*

\*\*\*

Estonte oni povas ne nur skribi leterojn,  
sed ankaŭ telefaksi aŭ telefoni. La adreso: Po-  
la Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950  
Warszawa, Pollando; telefaksilo: +48-22-  
444123 (ĉiam), tel. +48-22-459337, aŭ  
459358 (antaŭtagmeze).

\*\*\*

### Mesoj en esperanto

Esperanto-mesoj okazos ĉijare en la ka-  
tedralo de Speyer (Germanio), je la 15a horo:  
la 27-an de septembro, la 29-an de novembro.

Pliaj informoj:

*A. Kronenbergen, sacerdote,  
Am Wiesbrunnen 29, DW-6730 Neustadt 13,  
Germanio.*

\*\*\*

**Sinjo(r) ino Kolektanto**, kiu "hazarde" ko-  
lektis ankaŭ nian tekston dum la Viena UK! Ĉi-  
ujn trovitajn valorojn vi povas reteni, ni pe-  
tas vin sendi al nia redakcia adreso (eble en  
sennoma pakajo) nur la dokumentojn, adre-  
sojn kaj eble la filmon el la fotilo, kiuj por vi  
estas senvaloraj, sed por ni ege gravaj.

*Redaktoro de EVENTOJ,  
kongresnumero 650.*

\*\*\*

La e-klubo *Januaro* el Vorkuta (trovu ĉin  
sur la mapo por havi imagon) serĉas kontak-  
tojn. Kun granda atento ni akceptus ĉies kon-  
silojn kaj kunlaborproponojn.

Ni interesigas pri ruslanda monarkiismo,  
ortodoksismo, bahaismo, meditado, NIFO-j  
kaj e-muziko.

*RSU-169917 Vorkuta,  
ul. Leningradskaja 2, teatr kukol, Rusio.*

\*\*\*

Estas fondita Asocio de Sana Vivmaniero  
kaj Esperanto.

*252126 Kiev-126, pk. 551-B, Ukrainio.*

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.  
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.  
A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIUR.  
Készült az M & M nyomdában:  
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.  
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapeŝt.  
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unu-  
opaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Korespondi deziras

Ĵusa kursfininto serĉas korespondajn part-  
nerojn dise en a mondo. Jair Ferreira De Ame-  
ida, R.Caros Simoes Louro, 382; V. Isabel;  
BR-25800 Tres Rios-RJ, Brazilio.

### Ankaŭ Pola Radio helpas!

Ricevante pli kaj pli da petoj, la Esperanto-  
redakcio volas helpi la korespondemulojn. Do,  
se vi serĉas korespondant(in)on en Pollando,  
skribu al Esperanto-Redakcio, aldonante kel-  
kajn bazajn informojn (aĝo, profesio, hobia  
ktp.) pri si mem.

*Pola Radio, Esperanto-Redakcio,  
pk. 46, Warszawa, PL-00950, Polio.*

## Interese...

### Kiel nomiĝis L. L. Zamenhof?

En Starto 6/1991, p. 10-11 estas esperanta  
kaj ĉea traktaĵoj pri la "baptonomoj" de Za-  
menhof (tiun vorton mi uzas nur tial, por ke la  
granda plimulto de legantoj  
komprenu min; Zamenhof,  
estante hebreo, ne estis bap-  
tita). En la ĉea teksto estas  
mencio: "... li komencis  
subskribadi sin L. L. Zamen-  
hof, ne skribante iam tutan  
sian nomon, ne eblas do diri,  
ĉu li estis Lazar Ludvik aŭ  
Ludvik Lazar." La dua aŭto-  
ro en Starto diras sur p. 11,  
lasta linio super dika nigra  
streko, ke "Kiel universitata-  
no li fariĝis 'Lazar Markoviĉ  
Zamenhof'". Laŭ Enciklo-  
pedio, p. 580, li finis la uni-  
versitatan studadon en la ko-  
menco de januaro 1885.

En la Originala Verkaro  
(O.V.) tamen oni trovas sur  
p. 482 lian komunikon, adre-  
sitan al Vladimír Majnov, per poŝtkarto 21.VI.  
(3.VII.) 1889: "Mia plena nomo estas Ludvigo  
Lazaro (Ljudovik Markoviĉ Z-f)" kun noto, ke  
la nomoj inter krampoj estas skribitaj ruslitere.  
Atentu, ke la familia nomo ne estas skribita  
komplete, kaj la nekutiman formon Ludvigo  
(laŭ PIV Ludoviko). En sia 30-a vivojaro Za-  
menhof do ŝanĝis sian nomon.

Nun mi volas okupiĝi pri la familia nomo  
Zamenhof. Ĝi estas evidente germandevena,  
kunmetita el du vortoj: Samen - semo, Hof -  
korto. En la Zamenhofa familio oni parolis ru-  
se. En tiu lingvo ne ekzistas la konsonanto "h".  
Fremdajn vortojn, enhavantajn tiun ĉi konso-  
nanton, transskribas rusoj per "g" (ekz. Git-  
ler). Oni devas do rajte supozi, ke la familianoj  
prononcadis sian nomon "Zamengof", ĉar la  
germana "s" estas prononcata "z". Sed jam en  
la 1-a n-ro de la Esperantisto (1. sept. 1889)  
oni legas sub la gazetotitolo la germanan kaj es-  
perantan kolofonojn. En la unua estas: Dr. L.

S-ino Laura Fasalo kaj ŝia edzo, aktivaj  
membroj de "Amnestio Internacia" volas ko-  
respondi tutmonde.

*Via Varallo Pombia 42,  
I-28053 Castelletto Ticino, Italio.*

Konstantin Tarakanov, 17-jara, dez. kor.  
kun gejunuloj.

*ul. Galušina 3-4,  
RUS-163009 Arhangelsk, Rusio.*

Por trovi plum-amikojn, skribu al:

### Korespondanta Servo de Kroata E-Unuiĝo!

*Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.*

Samenhof, en la esperanta: Dr. L. Zamenhof.  
Sur p. 473 de Originala Verkaro, en la antaŭ-  
lasta alineo, mencias d-ro Dietherle, ke "Ofte  
Zamenhof subskribis sian nomon ne kun ĉiuj  
literoj sed nur kun kelkaj, ekz. 'Zamenh...' aŭ  
alimaniere". Sur p. 488 de la OV oni trovas sub  
n-ro 101 poŝtkartan informon al la jam menci-  
ita Vladimír Majnov: "Via L. Zamen..." La sa-  
mon oni vidas sur p. 499 sub leteroj n-ro 139  
kaj sur p. 500 n-ro 140. Ĉu tio estas taktiko pro  
la "h" kaj "g"? Aliaj rimarkindaĵoj: OV p. 585,

n-ro 375: Recepta folieto  
26.II. (11.3.) 1910: polling-  
va surpresajo: Dr. Ludwik  
Zamenhof. Sed por rusaj  
pacientoj li eble havis re-  
ceptojn kun rusalfabeta  
surpreso? Sur p. 602 oni vi-  
das leterpaperon kun sur-  
presita nomo: Dr. L. Sa-  
menhof, dato 4/17 II. 03,  
sur la plua paĝo: Dro. L.  
Zamenhof (sen dato, laŭ  
noto de d-ro Dietherle, eb-  
le 28. aŭ 29. X. 1907). Tial  
mi pensas, ke nia Majstro  
unue germanigis kaj poste  
esperantigis sian nomon  
pro taktika efiko: por esti  
pli proksima al "okcident-  
lingvanoj".

Rimarkigo de la redak-  
cio de Starto: la rusa transskribas "h" ankaŭ  
per "ĥ" (ekz. Ĥemingvej).

*Adolf Stanura  
El Starto, 2/1992.*

## Lastminute

### La Vegetarana Renkonto ne okazos!

Kun bedaŭro ni informas la aliĝintojn kaj  
interesigantojn, ke la 3-a Vegetarana Amika  
Renkonto en urbo Baja pro personaj kaj finan-  
caj problemoj okazos nur en la sekva jaro, en  
1993. Ni petas pardonon de ĉiu!

Pri la stato de TEVA (Tutmona Esperantista  
Vegetarana Asocio) en Hungario ni inten-  
cas dissendi la informojn en septembro.

*dr. Mária Papp, landa reprezentanto  
Kálvária u. 95/D, H-6500 Baja, Hungario.*